C.A. LAISANT

# LA PARLAMENTISMA ILUZIO

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
128B * 1979 * 0,50 FF

# L A   P A R L A M E N T I S M A
# I L U Z I O

En Francio, de pli ol unu jarcento, ni trapasis plurajn revoluciajn krizojn, kies rezultatoj ŝajne ne multe instruis la proletaron de nia lando nek tiun de la aliaj nacioj.

Tamen nekontesteblas, ke tiom da penoj, tiom da oferoj fariĝis ja nur ega mistifiko. La sufero de la subprematoj estas ĉiam tiel granda, eble pli granda, ĉar la ekonomia transformiĝo de l'mondo ĝin nur pligrandigis. La tiraneco kaj la subpremo ŝanĝiĝis nur nome kaj forme.

Anstataŭ la sola tirano aŭ tiraneco de privilegia klaso, stariĝis la financa kaj kapitalisma potenco, kiu ŝtelas de la laboro la plej grandan parton de la riĉeco, kiun naskas tiu laboro. La laborulo, spite ĉiajn deklamadojn, restis la eterna ekspluatato, la eterna sklavo; kaj oni malfacile ekvidas, eĉ nune, la momenton, kiam li povos ekliberiĝi.

La kaŭzo de tio estas, ke ĉiuj revolucioj de l'modernaj tempoj estis ekskluzive politikaj revolucioj.

Kiam, en 1848a, oni alportis al la franca popolo la universalan voĉdonadon, ŝajnis, ke oni tuj atingos la promesitan landon, ke oni tuj vidos la komencon de epoko justeca, libereca kaj plibonesta por la mizeruloj. La elreviĝoj tamen rapide alvenis; sed ili ne sufiĉis por forigi la iluziojn ankoraŭ daŭrantajn.

Ĉar post ĉiu krizo, je ĉiu stariĝo de nova reĝimo, per mekanismo identa al ĝi mem, oni konservis la antaŭan reĝimon.

Tiu ĉi politika mekanismo nomiĝas la Parlamentismo.

En nia lando, en respubliko, ĝi konsistas kredigi al la popolo, ke ĝi estas tutpotenca, ke ĝi povas ricevi, per siaj reprezentantoj libere elektitaj, ĉiujn reformojn, ĉiujn transformiĝojn.

La vero estas, ke sub tiu aspekto, la efektiva regado apartenas kaj povas aparteni nur al la posedanta direktanta kaj financa burĝaro, kiu ekspluatas por sia ekskluziva profito la laborantan amason.

La supereco de l'popolo konsistas el la rajto, kiun ĝi havas, unutage ĉiun kvaran jaron, deponi en skatolon, paperfolion surhavantan iun nomon.

Per ĉiuj mensogoj, per ĉiuj minacoj, per la faroj de subaĉetita gazetaro, oni insti-

gas la dikan amason de la ekspluatatoj, ke ili iĝu tiamaniere reprezentataj (?) laŭ la deziro de tiuj, kiuj tenas la povon, kaj kiuj estas nur la humilaj servistoj kaj iloj de la financistaro. Se tio ne sufiĉas, oni uzas materian trompon; la urnoj enhavas duoblan fundon; la balotaj listoj estas miksitaj; oni voĉdonigas centojn kaj milojn da mortintaj voĉdonantoj, ktp.

Sed, eĉ akceptante la neeblan hipotezon de regula, lojala, honesta baloto, ĉu oni ne ekvidas la kolosan absurdon de la sistemo ? Ĝi supozigas ĉe la voĉdonanto nekomunan dozon da juĝkapablo, senegalan prudenon; ĝi supozigas ĉe la elektito universalan kompetenton, profundan konon de ĉiuj aferoj, kaj senpekan konsciencon.

Kiam temas pri la plej malgranda konfidatesto, ni ĉirkaŭigas nin per ĉiuj imageblaj antaŭzorgoj por esti certaj, ke nia rajtigito bone kaj fidele plenumos sian mision; li nin reprezentos por difinita tempo, por klare difinita objekto, kaj lia povo estos ĝuste limigita.

Kaj kiam ni forlasas al individuo, per la parlamentismo, la eblon "fari leĝojn" dum pluraj jaroj, nenia garantio estas prenita. Laŭ fido de malklaraj promesoj, padank'al retoriko liverita en ronkantaj paroladoj, aŭ al lerte dissemitaj donacoj, li ricevis la plimulton da voĉoj; li estas

balotita. Li disponos dum kvar jaroj kun liaj kolegoj, pri via riĉeco, pri via libereco, pri la vivo de viaj infanoj. Li leĝofaros pri la imposto, la publikaj laboroj, la instruado, la teatroj, la agrikulturo, la religioj, la gazetaro, la komerco, pri ĉio. Plie, li subtenos aŭ malstarigos la ministrarojn.

En tiu lasta rolo, malpli malutila, ĉar en la parlamentisma reĝimo, ĉiuj ministraroj, ĉiuj registaroj valoras unu la alian. Ĉiu el ili, kiel faris la antaŭulo kaj kiel faros la posteulo, faras laboron premegan kaj reakcian, kaj alian ne povas fari.

Ĝi tion ne povas, ĉar ĝi estas, pro la fatalo de la institucioj, la ilo je la servo de la burĝa potenco, enkarniĝinta en la altranga financistaro, sola efektiva potenco. Neniam la popolo estis aŭ estos reprezentata en la parlamentoj. Nur la burĝaro havas realan agadon; pretekstante la konservon de l'Ordo, ĝi asekuras al si la plenan konservon de siaj privilegioj, kaj sin gardas kontraŭ ĉia socia transformiĝo, kiu povus malgrandigi la hontindan eksplutadon de la homa laboro, fonto de ĝia superregado.

La proletoj estas la ĝismortaj malamikoj de si mem, kiam ili akurate kontribuas al tiu malinda komedio balotada, kies perioda okaziĝo signifas ĉiam por ili kreskantan mizeron kaj konservadon de l'eterna sklaveco. La espero al realaj reformoj, kaj ne nur ŝajnaj, estas pura kimero; kaj ne povas esti alie, ĉar veraj reformoj kondukus al la renversiĝo de la "socia ordo", sur kiu kuŝas la tuta reĝimo.

Por la franca proletaro, la eksperimento devus esti konvinkinta post tridek ok jaroj da fiburĝa kaj reakcia respubliko. Sed kiam, en aliaj landoj, oni vidas kompatindulojn pretajn morti por akiri la Universalan Voĉdonadon, oni rajtas admiri la trezorojn da naiveco, kiun la homa konscienco povas rezerve enteni. Oni samtempe bedaŭras, ke tia sumo da energio, da kuraĝo kaj de abnegacio, povas esti tiel fuŝe uzata.

Sed, oni ofte diras, necesas pacienco kaj persisto. Se, per aktiva propagando, oni komprenigus al la proletoj, ke ili estas la granda nombro, ke sufiĉas al ili bone interkonsenti por sendi al la parlamento grandegan plimulton da fidelaj kaj energiaj reprezentantoj elektitaj de ili, la socia transformiĝo nepre efektiviĝus.

Ankaŭ tio ĉi estas iluzio. Unue, je la

alproksimiĝo de la danĝero, la burĝaro sin antaùgardus kontraù ĝi; poste, eĉ balotitaj, la reprezentantoj de la proletaro povus ne esti proklamitaj de la burĝaj ministroj, posedantoj de la urnoj kaj disponantaj pri ĉiuj sociaj fortoj : armeo, polico, juĝoj, ĝendarmoj. Trie, oni ne forgesu, ke ekzistas konservema Senato en la parlamenta maŝino, ĝuste por malhelpi tiajn eventualaĵojn. Fine, oni tro facile forgesas, ke unu proleto eniranta la parlamenton, fariĝas unu burĝo plia, deknaù fojojn el dudek, kaj ĉesas reprezenti tiujn, kiuj konfidis al li mision; kaj tio, sen ke oni povu krii pri perfido, sen ke oni povu eĉ riproĉi al la balotito. Ĉar efektive la misio estas nur fiktivaĵo, tial ke ĝi estas tro malklara kaj vasta; kaj la homo estas kaptita, transformata, digestata de la parlamenta medio. Senkonscie, bonfide, li sin lasas solvi per tiu daùra ĉiutaga efiko. Kaj la elektintoj mirigataj, iam ekvidas, ke anstataù homo, ili havas antaù si politikiston. Furiozaj, ili rekomencas, kun alia, prefere ol konfesi, ke parlamentismo kaj reformoj estas du nekunigeblaj terminoj.

Oni bonvolu rimarki, ke mi nenie parolis pri la malalteco de karaktero, la profitemo, la ambicio al la povo, kiuj povas regi la

membrojn de parlamento. Tio ne signifas, ke mi neas la malglorajôojn, la perfidojn, la malkuraĝaĵojn, la ŝtelojn, pri kiuj ni kelkafoje havis la spektaklon. Sed mi opinias, ke tiuj individuaj disrompiĝoj de konscienco estas pli maloftaj, ol oni ĝenerale kredas. Kaj, se supozante individuojn kun senpeka konscienco, mi montras, ke la sistemo estas fatale senpotenca por efektivigi ĉiun realan reformon, kiel tio ne estos des pli vera se, okaze, kelkaj politikistoj ne estas anĝeloj de pureco ?

Tial oni trovos en tiuj ĉi pripensoj, nek insulton, nek propran nomon.

La pereiga efiko de la parlamentismo estas tiel granda, ke ĝi verŝajne igus senpotenca popolan revolucion, se tiu ĉi estus eblá. Supozu, morgaŭ - neverŝajna hipotezo - ke ĉiuj ekspluatatoj de Francio unuiĝis en komuna sento de kolero, ribelo kaj tedo, kaj promesis fini pri la burĝa Respubliko kaj starigi novan socian reĝimon. Supozu, ke la armeo helpas al la Revolucio, ke la ministrejoj estas forlasitaj, la deputitoj forkurantaj, la Senato likvidita, kaj ke la popolo estas mastro de la Banko, de ĉiuj bankoj kaj administracioj. Supozu ankoraŭ, ke en la grandaj laborejoj kaj publikaj servoj, malgraŭ la momenta emocio,

la laboron oni rekomencis, per la zorgoj de laboristaj asocioj. Ĉu oni imagas, ke la venkintoj ne obeos la tradicion, ke ili nelokos en la Urbdomon, en la Laborborson aŭ aliloken, revolucian registaron, kies membrojn la telegrafo sciigos al la tuta lando ? Tiu registaro funkcios dum kelka tempo per dekretoj; poste, respekteme pri la popola superrego, dezirante sin aprobigi, ĝi alvokos la popolon al siaj kunvenoj.

De tiam, hieraŭaj burĝoj aŭ morgaŭaj burĝoj, ĉiuj kriante : "Vivu la Socia Revolucio!" eniros tra la malgranda pordo, kaj denove formos parlamenton, kiu senprokraste ekrememorigos nin pri la monumento da maljustaĵoj disbatita la hieraŭon. Oni estos ŝanĝinta la mastrojn, almenaŭ parte; eble kelkaj sklavoj hieraŭaj siavice fariĝos mastroj; sed la sklavigo pludaŭros. La parlamenta veneno estos farinta sian efikon. La parlamentismo rekomencos siajn malbonfarojn.

Tiu institucio ŝajnas unue prezenti garantiojn justecajn kaj prudentajn. Ĉar dispłuraj milionoj da homoj ne povas ope diskuti, oni diras, ke estas kompreneble, ke ili sendu delegitojn por plenumi tiun taskon; poste, kiam kunvenos tiuj delegitoj, ĉar ĉiu temo estos serioze diskutata, ĉar

ĉiuj opinioj povos libere esprimiĝi, ĉiu havos sian konsciencon lumigita, kaj la plimulto decidos. Kio estas pli justa, kio estas pli prudenta ?

Tio estas la teorio. Por kompreni, kio estas la praktiko, sufiĉas esti ĉeestinta kelkajn parlamentajn kunsidojn. La impreso sentita estas tiu pri malbone ordigita lernejo, pri lernantoj malbone edukitaj, farantaj bruegon kaj grimacojn, kiuj memorigas la palacon de la simioj.

Jen du parlamentismaj aksiomoj : la parolado neniam ŝanĝis balotdecidon! La motivoj de voĉdono neniam fontas el la temo de l' diskutado sed ja el flankaj konsideroj! Plej ofte oni sin demandas : Ĉu subteni la ministraron, ĉu ĝin renversi ? Kaj ekzistas la deputito, kiu atendas tabakvendejon, tiu, kies bofilo devas fariĝi subprefekto; ekzistas ankaŭ la bona patriota besto, al kiu oni venas diri mezlaŭte kaj sekrete : "Se la ministraro estos renversita hodiaŭ vespere, morgaŭ la germanaj trupoj transpasos la landlimon."

Ne, en ĉio ĉi, nenio estas ekzameninda : nek sincera voĉdonado, nek ebla reprezentado, nek serioza diskutado pri iu ajn temo. Ekzistas nur dekoracio, parado kaj mensogo, kies nura celo estas asekuri al la burĝaro,

al la altranga financistaro, la efektivan posedon de la povo, konservi la subpremadon kaj la ekspluatadon.

Tiu brita importo povis kaj povas ankoraŭ taŭgi por Britio, kiu posedas aristokrataron sciantan preni respondecon. Ĝi ne adaptiĝas al lando, kiu pretendas esti demokratio, sed kies reganta klaso havas nur apetitojn kaj konservas sian superregecon nur per mensogoj.

Eĉ en Britio, la parlamentismo certe iam malaperos. En Francio, estis freneze lasi tiun venenan herbon kreski. Mi eble havas iom la rajton paroli kun tia libereco pri la parlamentismo, ĉar mi pasigis dek sep jarojn de mia vivo en la parlamento (de 1876 ĝis 1893). Mi ĝin eniris dum mia juneco, tuj post la milito, kun ĉiuj iluzioj, kaj mi eliris el ĝi, laŭ mia volo, post tiu tro longa eksperimento. Mi provis fari iom da bono; mi ne sukcesis. Tre certe, mi ne pretendas esti la sola en tiu okazo; kaj mi ne volas kondamni tiujn, kiuj estas ankoraŭ hodiaŭ la viktimoj kaj trompitoj de la iluzioj, kiuj iam estis miaj, kaj kiujn havis miaj elektintoj. Mi konscience provis plenumi mian mision, malebligi la maljustaĵojn, enigi en niajn instituciojn, iom da humaneco kaj justeco. Tio estis neebla. La

burĝara reĝimo tion opozicias laŭ sia naturo mem, kaj ĝiaj leĝoj celas nur regul- igi la maljustecon, certigi la superregadon de la pli fortaj super la pli malfortaj. La sistemo postulas kruelon, sangavidon, kvankam la individuoj, kiuj ĝin uzas, povas esti humanaj kaj bonaj. De tiu sistemo, starigita kontraŭ ĝi, la popolo nenion atendu.

Apenaŭ kelkaj okazaĵoj venas de tempo al tempo frapi ĝian cerbon kaj vibrigi ian emocion. Unu el tiuj faktoj estas la ago, per kiu la pseŭdoreprezentantoj de l' popolo pligrandigis sian parlamentan salajron. La ago estis defendebla; estis argumentoj en ĝia favoro. Ĉu oni ilin montris ? Ĉu oni petis la publikon, ke ĝi ekzamenu la demandon ? Neniel. Sekrete, kaŝeme, en duona horo, kiel oni faras malbonan agon, en ambaŭ ĉambroj samtempe, kun la apogo de l'ministraro, oni atribuis al si 15000 frankojn anstataŭ 9000. Kaj tio estas leĝa. Kaj se anstataŭ 15000, oni estus fiksinta la parlamentanan salajron je 30000 aŭ 100000 frankoj, ankaŭ tio estus leĝa. Ĉu tio ne sufiĉas por montri al la reganta popolo, ke ĝia regeco proksimume valoras tiun de la kamparanoj de Lia Moŝto Nikolao la Dua, la fidela amiko

kaj alligito de la franca burĝaro de l'Dudeka jarcento ?

Sed kion konkludi ? Ĉu necesas, ke la proletaro rezigne forĵetu ĉiun bataladon, ĉiun esperon, ke ĝi pasive akceptu la premegon, por ĉiam ? Neniel. Sed voĉdoni, tio ne estas batali. Kaj rifuzi voĉdoni, tio estas komenco de efika batalado.

La grandega kulpo de la burĝaro, nome en Francio, estas, ke ĝi lasis efektiviĝi komencon de popola instruado. Ĉu estis malsprite ? Ĉu estis time ? Ne gravas. La fakto estas. La granda plimulto de la proletaro povas hodiaŭ instruiĝi. La malmulto, kion lernas la infanoj en la lernejo, sufiĉas por obligi al ili pripensi kaj studi, kiam ili estas elirintaj. Alian kaŭzon oni ne devas serĉi pri la kreskiĝo de la sindikatisma movado, dum la lastaj jaroj.

Tien devas iri la popola penado, se la popolo pretendas atingi sian liberiĝon. Ĉiu balotanto ĉesu partopreni la periodan balotan ŝercon, aŭ, se li devas partopreni, pro privata singardemo, li voĉdonu por Spartako, por Karlo Marks, aŭ por Cambronne (Kambron') - eĉ por Don-Kiĥoto, sed neniam por vivanto. Sed lia tuta peno iru al la sindikatisma organizo. Lia ĉefa priokupo estu akiri lokon ĉiutage pli grandan por

tiuj organizoj, kiuj iam ricevos la tutan profiton de la konfido, kiun estos perdintaj la parlamentoj; kaj ni estos pli proksimaj al la necesa socia transformiĝo ol per jarcentoj da parlamentanaj paroladoj.

Tio tamen ne sufiĉas. Ĉiu proleto havas la devon fari, sola, revolucion la plej malfacilan el ĉiu, kaj kiu estas la necesa kondiĉo por la fina triumfo. Tiu revolucio estas tiu de ĝia propra cerbo, de ĝia individueco, de la individueco de ĝiaj infanoj. Instruiĝi, lerni pensi mem, sin liberigi de la antaŭjuĝoj, la pereigaj kutimoj, sin gardi kontraŭ la alkoholismo (tiu fundamenta institucio de l'burĝaro), kontraŭ la religia spirito, veneno ne malpli pereiga; konservi fortikan spiriton en sana korpo, malgraŭ la lacigoj de ĉiutaga laboro, kiu ofte dispremas la homon; tia estas la devo; tia estas la savo.

La homo estas sociema besto. Sed neniu socio ekzistas nur per la individuoj, kiuj ĝin formas. Fondi la kolektivan feliĉon sur la individua malfeliĉo estas unu el la paradoksaj maksimoj, kiun honoris la fiburĝaro por fondi sian potencon sur la mizero de l'granda nombro. Ju pli la individuoj estos fortikaj, liberaj, bone ekvilibritaj,

des pli fortika kaj firma estos la socio, kiun formas tiuj individuoj. Sed tamen necesas vivigi alian elementon, solan racian bazon de efektiva moralo : la Solidareco. La unuiĝo por la batalado trudiĝas ĉe ĉiu homa aro; la malfeliĉo de unu sola estas malfeliĉo por ĉiuj. Tial necesas reguligi nian liberecon. Tiu ĉi estas, laŭ fama difino, nur la povo ekzerci laŭplaĉe niajn kapablojn. Do, se ilin ekzercante, ni malhelpas la ekzercadon de alies kapabloj, ni eŝtigas neeviteblajn venĝojn al ni. Kaj tion ja faris la burĝaro sub la nomo "publikaj liberoj" kaj sub la protekto de la parlamentisma regeco, ĝi instituciigis sub la monarkioj kiel sub la respubliko, la sistemon, kiu ebligas, ke malplimulto riĉiĝu sen limoj je la malprofito de servuta plimulto.

Kresku, fizike kaj intelekte, proletoj ĉiulandaj; kulturu kaj apliku la grandan leĝon : solidareco.

Forlasu la parlamentisman iluzion; portu viajn penojn al la sindikatisma organizo, al la konscia unuiĝo. Kaj la dezirata liberiĝo, la alveno de malpli kruela reĝimo estos malpli eterne prokrastataj.

Malavara sango fluas en viaj vejnoj; ne freneziĝu, ĝin oferante por kimero.

C.A. Laisant

Noto de SAT-broŝurservo :

Tiu ĉi teksto origine aperis en esperanta traduko de F.B.G. en la kolekto "Paco-Libereco" antaŭ la unua mondmilito.
La lingvon kelkloke korektis aŭ modernigis SAT-broŝurservo.
La noto de l'verkinto, kiu atentigis pri la evoluo de kelkaj politikaj difinoj en la tiama Francio (oportunisto, radikalisto, progresisto, ktp) ne plu havas aktualan valoron kaj ne aperas en tiu ĉi reeldono.

***

SAT-broŝurservo : La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut .

**************************************************

Directeur de publication & imprimeur: Baudé
Commission paritaire de presse n° 39 863 **

En la sama broŝurkolekto :
*************************

J.Duboin/PV.Berthier: Abundo k konsumsocio
Malatesta: Anarkio k organizo k.a. tekstoj
HD.Thoreau: Civila Malobeemo
Pario: Durruti,simbolo de la hispana revol.
Jack London: La forto de la fortaj
Oscar Wilde: La homa animo sub socialismo
Han Riner: Individuismo en Antikveco -
Individuista Manlibreto - La Kvina Evangelio
La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes
Sébastien Faure: La krimoj de Dio
Diversaj aùtoroj: La liberecana penso
Fontaura/J.Grave:Liberecanaj vivkonceptoj
La Boétie: Memvola servuto
Roza Luksemburg: Naciecaj problemoj
E.Bellamy: Parabolo pri la cisterno
Paul Lafargue: La rajto de pigro
Domela-Nieuwenhuis: La Piramido del'Tiranismo
Kropotkin: Revolucia registaro k.a. tekstoj
J.Ingenieros: La triviala homo
E.Lanti : La laborista esperantismo - El verkoj de Lanti - Adamaĵoj
J.Rostand: Tiu, kiu ne volas morti
A.Pannekoek : Historia materiismo - Antropogenezo
Eugen Relgis: Humanitaristaj principoj
ktp, kc.

Petu detalan liston kaj abonkondiĉojn!